

Esperanto-Numismatika Asocio



Esperanta Numismatiko

2024

Jarkolekto 11 - Numero 1



ENHAVOTABELO

de januaro 2024

Titolpaĝo: <i>Frank Ivo van Damme B, X2 (1923-) C.H. Beels</i>	1
Enhavotabelo	2
De ni por ... ni!	3
Moneroj & medaloj	4
<i>Universala Kongreso en Kolonjo 1933</i>	
<i>35a Hispana Kongreso de Esperanto 1975</i>	
<i>Hildegard von Bingen (1098-1179)</i>	
<i>68a Universala Kongreso de Esperanto 1983</i>	
Spikumajoj & suplementoj: Bulgara “ora” medalo kun atesto	9
La granda kvizo (2): solvoj	10
Por spuremuloj!	11
Aspektoj de numismatiko: Ekslibrisoj (1)	12
Medalistoj: 34. Bogomil Ĵivkov (°1946)	15
Valormarkoj & valorbiletoj: SAT-kotizmarko	17
Historiaj aspektoj: Esperantaj insignoj	19
Terminaro: Alfabeta listo (36)	21
El la gazetaro: “Rakonto” (Petro Desmet)	22
Retpoŝto	24
Anoncoj & eventoj	39

Honora membro: Hans Jankowski (1928-2018)

Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts
Provlegado: Jozefo Horvath
Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!
Finredaktoro: Bert Boon

Kontakto: bert.boon@skynet.be
Retejo: <http://ena.frali.bplaced.net>
www.esperanto.es/biblioteko
www.kolektado.esperanto.cc

DE NI POR ... NI!

*Ne identigita numismatikaĵo, jen banala metalaĵo,
identigita specimeno, jen valora historia atestaĵo!*

Karaj membroj kaj karaj legantoj en pli ol 44 landoj!

Permesu, ke mi denove per ĉi tiu redakcia artikolo deziru al vi ĉiuj feliĉon kaj prosperon kaj ankaŭ al ĉiuj samtempoj en la vasta mondo, kiuj tiom sopiras vivi en pli pacema mondĉivito.

Samtempe mi tutkore dankas ĉiujn el vi, kiuj jam reciproke sendis bondezirojn al la ENA-redakcio por esprimi la esperon, ke ENA senĉese kreskos kaj sukcesos disvastigi sian mesaĝon en ĉiuj kontinentoj.

Kio ege ĝojigas nin, estas la novaĵo, ke *du el niaj membroj* en 2023 iĝis laŭreatoj de speciala honorigo kiel “Esperantisto de la Jaro”, nome nia ĉina samideano Sun Minĝiao (Semio), kiu gajnis la “*oran medalon*” kaj nia itala samideanino Elda Dörfler el Triesto, la prezidantino de ELF-AREK, la asocio por esperantaj filatelistoj, kiu akiris la “*bronzan medalon*”. Internacia ĵurio de la revuo “La Ondo de Esperanto” distingas ekde 1998 per tiu ĉi honora titolo elstarajn Esperanto-agantojn de ĉiu jaro. Tutkorajn kaj sincerajn gratulojn al ambaŭ niaj aktivuloj!

Sekve iom pri la aktuala numero de nia revuo, kiu ekstartas plugi la terenon de la 11a jarkolekto. La koncepto de la antaŭaj dek jarkolektoj restos identa, almenaŭ provizore. Se iu el vi havus proponojn aŭ novajn ideojn, vi estus petataj reagi!

Tamen, la unua numero de 2024 jam ricevis novan “adaptitan” simbolon sur la titolpaĝo, sed tion konstatu vi povas mem... (bedaŭrinde, bona respondo ne meritos specialan premion al iu el vi, ĉar, kiel vi jam scias, ENA ne havas kason kaj ĝi do restos unu el la plej malriĉaj asocioj en Esperantujo!).

Krom kvar “novajn” medalojn, vi en ĉi numero ankaŭ malkovros en la rubriko “Medalistoj” elstaran skulptiston-medaliston, la “viran parton” de eminenta bulgara geedza paro, el kiu la edzino, Maya Gorova, ankaŭ estas artistino, pli precize pentristino. Sinjoro Ĵivkov, kies edzino krome estas samideanino, en 1987 kreis t.n. “oran” esperantan medalon kaj ankaŭ diversajn esperantajn plaketojn, kiujn, dank’al la afabla kunlaboro de ambaŭ artistoj, ni povos montri kaj priskribi en almenaŭ kvar numeroj. Vi ankaŭ jam scias, ke vi trovos informojn en diversaj aliaj kutimaj rubrikoj pri diversaj numismatikaj objektoj kaj aspektoj. Multan plezuron!

Lasu nin fini per alia pozitiva mesaĝo: la nombro de individuaj membroj en 2023 kreskis per dek novaj, diverslandaj samideanoj ĝis 167 membroj-abonantoj! La nombro de asociaj membroj stabiligis je 25 organizoj, kiel muzeoj, bibliotekoj kaj eĉ universitata fakultato...

Jen nia aktuala kalejdoskopeto, kiu montras, ke Esperanto-Numismatika Asocio estas vere plenviva kaj perspektiva!!!

Bert

MONEROJ & MEDALOJ

Tipo A3 - Esperantaj medaloj kun ne-esperantaj aldonoj

Universala Kongreso en Kolonjo 1933



Lando: Germanio
Metalo: ferlado
Mezuroj: 38 x 26 mm
Jaro: 1933

Kvanto: *serĉata*
Pezo: 21,50 g
Medalisto: *serĉata*
Diko: 2 mm

Averso:

ĉirkaŭe: ovala "laŭrokrono" kun surskribo "UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO"

supre: Esperanto-steleto kaj "25"

ene-supre: vidaĵo de la urbo Kolonjo en la tridekaj jaroj

ene-meze: rubandeto kun surskribo: "29.7.KÖLN 5.8."

sube-meze: kronita emblemo de la dua germania imperio: du-kapa aglo

ambaŭflanke de la aglo: "19....33"

Rimarko 1:

du-kapa aglo: la du kapoj simbolas unuflanke la okcident-romian (285-476) kaj aliflanke la orient-romian (477-1453) regnojn. La kapoj do rigardas respektive okcidenten kaj orienten.

Rimarko 2:

foto de la sama vidpunkto nuntempe

Rimarko 3:

en 1933 okazis la 25a UK en Kolonjo



Tipo E1 - Ordenaspektaj medaloj

35a Hispana Kongreso de Esperanto 1975



Lando: Hispanio

Metalo: aluminio

Diametro: 30 mm

Jaro: 1975

Kvanto: *serĉata*

Pezo: 6,75 g

Medalisto: *serĉata*

Diko: 1,50 mm

Averso:

ĉirkaŭe: surskribo: “XXXV HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO”

maldekstre: “LERIDA”

meze: verda emajlita steleto / urba panoramo

sube: “18-22 JULIO 1975”

Rimarko 1:

la pendigileto supre montras, ke temas laŭ funkcio pri insigno, fiksebla per rubandeto kaj fiboleta

Rimarko 2:

la urbonomo Lérida estas la hispana versio de la kataluna Lleida

Rimarko 3:

Lleida estas urbo en la okcidento de Hispanio, en la samnoma provinco. Ĝi situas en la aŭtonoma regiono Katalunio



IGNOTA LINGUA



La vorto “ignota” signifas “nekonata”. Temas pri kreita lingvo, konstruita de la abatino Hildegard de Bingen. Por povi skribi la lingvon, ŝi kreis alfabeton de 23 literoj, la t.n. “literojn nekonatajn”.

La 23 litterae ignotae de Hildegard

La lingvon priskribis la abatino mem en verko latinlingva: “*Ignota lingua per simplicem hominem Hildegardem prolata*”. Pluekzistas du manuskriptoj de la sama aŭtorino kun ampleksa enhavo: la “Riesenkodex” kaj la “Berlina manuskripto”. **Ĝi estas la plej malnova priskribo de “konstruita lingvo”!** Temas pri listo de 1012 vortoj, fakte nur substantivoj. Unu manuskripto montras latinajn tradukojn, la alia germanajn.

Hildegard verkis multajn antifonojn (= versoj kantataj aŭ recitataj je la komenco de psalmo aŭ alia biblia himno). Unu antifonon ŝi probable verkis en la ignota lingva. La antifono sugestas, ke la celo de la konstruita lingvo estis mistikeca:

O *orzchis* Ecclesia,
armis divinis praecincta,
et hyacinto ornata,
tu es *caldemia*
stigmatum *loifolum*
et urbs scienciarum.
O, o tu es etiam *crizanta*
in alto sono,
et es *chorzta* gemma.


La teksto estas latina, tamen ĝi enhavas kvin nelatinajn vortojn. Nur tri el la nelatinaj vortoj similas al vortoj en la vortlisto. En ĝi oni povas dividi laŭteme tri kategoriojn: la spiritan mondon; la homan kaj krome la naturan mondojn (entute do 1012 vortoj). Se tiu teksto estus reprezentiva por la strukturo de la lingvo, dirindus, ke ne temas pri aŭtonoma lingvo, sed pri releksikonigita vario de la latina. Eble la teksto estas latina, sed nur “spiritigita” per kelkaj pruntvortoj el la konstruita lingvo.

El pluraj vidpunktoj ĝi similas al ceteraj apartigaj lingvoj el la 20a jarcento, kiel “medefajdrino” kaj la “eskaja lingvo”. Ambaŭ evoluis al ensociiĝintaj lingvoj, dum ignota lingva reprezentas neevoluintan ĝermon de tia lingvo. Hildegard cetere ne instigis aliajn por lerni kaj uzi sian lingvon.

Bibliografio: Higley Sarah L. “*Hildegard of Bingen’s Unknown language*”. An Edition, Translation and Discussion Palgrave Macmillan (Tiu libro enhavas la kompletan vortaron el ambaŭ manuskriptoj kun tradukoj kaj detalaj komentoj).

Tipo B1 - Ne-esperantaj moneroj kaj medaloj rilate al Esperanto

Hildegard von Bingen (1098-1179)



Lando: Germanio

Kvanto: *serĉata*

Metalo: kupro (bronzita)

Pezo: 69,22 g

Diametro: 50,5 mm

Medalisto: Victor Huster

Jaro: 1998

Diko: *serĉata*

Averso:(unuflanka medalo)

inter la jarindikoj 1098 kaj 1998 troviĝas bildo de la turo de la monaĥejo Rupertsbergo apud Bingen. Staras antaŭe en halo la figuro de Hildegardo kiel sanktulino.

surskribo: “HEILIGE HILDEGARD GEBOREN IN BERMERSHEIM BEI ALZEY” (= sankta Hildegardo naskita en Bermersheim ĉe Alzey)

ambaŭflanke: “FLORIAN GEYER INV.”

“VH INC”

rande: “V HUSTER BADEN BADEN”

Rimarko:

Hildegardo de Bingen (germane: Hildegard von Bingen; latine: Hildegardis Bingensis; 1098-17an de decembro 1179), krome konata kiel Sankta Hildegardo kaj “Sibilo de Rejno”, estis germana, benediktana abatino, verkistino, komponistino, filozofino, mistikulino, viziulino ...

Ŝi estis famega komponistino de sanktaj monofoniaĵoj, fakte la plej populara kaj plej ofte registrita muzikistino nuntempe sur (kompakt)diskoj. Krome ŝi fondis monaĥejojn en Rupertsberg (1150) kaj Eibingen (1165), verkis teologiajn, botanikajn kaj medicinajn artikolojn kaj leterojn, liturgiajn kantojn kaj poemojn. Hildegardo eĉ kontrolis la miniaturajn ilustraĵojn en la rupertsberga manuskripto de sia unua verko “Scivias”. Ŝi do estis vere “homo universalis” **jam kelkajn jarcentojn antaŭ la t.n. renesanco!**

Tipo D2 - Plaketoj kaj medalonoj

68a Universala Kongreso de Esperanto 1983



Lando: Hungario
Substanco: argilo
Diametro: 75 mm
Jaro: 1983

Kvanto: *serĉata*
Pezo: 26,860 g
Medalisto: *serĉata*
Diko: *serĉata*

Averso:

supre: steleto + UK (= simbolo de la tiama Universala Kongreso)

meze: ornamaĵo kun speco de floreto kvarfolia

sube: 1983 BUDAPESTO

Reverso:

surskribo: "68a UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO"

Rimarko 1:

ĉe murmedalo kun pendoŝnuro la reversa flanko kutime restas tute neuzata!

Rimarko 2:

la aversa flanko de la argila medalo aspektas kiel vakssigelo

Rimarko 3:

komparu kun la specimeno en bronzo, priskribita en jk. 5, n-ro 4, p. 5



SPIKUMAĴOJ & SUPLEMENTOJ

Bulgara “ora” medalo kun atesto



La laŭreato de ĉi “ora” memormedalo estis la bulgara esperantisto Petar Totev el Sofio, membro de la Esperanto-societo “P. Mihajlova”.

Li ricevis la medalon – kreitan de Bogomil Ĵivkov kaj dediĉitan al la 100jara jubileo de Esperanto – kaj la ateston ĉi supre, la 20an de aprilo 1988.

Ni dankas kaj nian samideaninon Mariana Evlogieva kaj la pentristinon Maya Gorova, ambaŭ el Bulgario, pro la tre taŭgaj kaj kompletaj informoj pri la priskribita objekto.

“LA GRANDA KVIZO PRI LA SPESMILO” (2)

Solvoj

Mi ĉi-sube kompilis ŝlosilon kaj eventualajn klarigojn.

b. 22- karata (menciita en la difino)

b. 8 gramoj (menciita en la difino)

b. 1363,7 (1000-oble 1 dividita per la pezo de la pur-ora enhavo de 1 Sm – $1/0,7333$)

a. 0,7333 ($8\text{ g}/10 * 22/24$); pura oro = 24k, sed 10 Sm difiniĝas kiel 8g da 22k-oro (alivorte, decimala fajneco de 0,916)

a. kaj b. (tia monero, je pezo de malpli ol 1 g. estus malfacile manipulebla, kaj samtempe je pli ol €40 estus tro altvalora)

S,U,E,R,E (la nomo de tiu monero en E estas Suvereno.)

a. 9,9985 (la Suvereno efektive valoras iomete malpli ol 10 Sm. Sed la diferenco estas tiel malgranda, ke praktike oni povas trakti tiun moneron kiel 10 Sm.)

a. Jes kaj fiksita (oni kalkulas la or-enhavon de la koncerna monero kaj komparas kun la laŭ-difina or-enhavo de la spesmilo. Ekz. La franca 20-franka or-monero (Marianne) pezas (se ne trivita) 6,4516 g kaj la fajneco estas 90 %, do ĝi entenas $0,9 * 6,4516 = 5,806$ gramojn da pura oro. Dividita per 0,7333 = 7,918. Do oni povas ĝin konsideri 8 Sm, - kompreneble, se, pro troa cirkulado, la monero pezas malpli ol la plenpezo, oni uzu la pesitan pezon.

a. 42,42: oni citas la prezojn de la nobelaj metaloj por fajnuncoj; por kalkuli la prezon de oro en gramoj dividu per 31.10305, tiam dividu tiun prezon per la pezo en gramoj de la laŭ-difina or-enhavo de 1 Sm, do $31.1035/0.7333\text{g} = 42.415$, do preskaŭ 42,42. Ekz., se la prezo de oro citita, en la Reto, estus en dolaroj (US) \$2000, la kurzo estus 1 Sm = €47.15

a. 78 (ĉar kiam mi kompilis la teston, oni bezonis tiom da uncoj da arĝento por aĉeti 1 uncon da oro – hodiaŭ la rilatumo estas ĉ 84. Tiu faktoro ne estas nuntempe tute stabila, kvankam dum longa periodo en la pasinteco ĝi ne multe deviis de 15 sed)

c. $10000*(24/22)/8$ (se vi kontrolos, vi trovos, ke tiu formulo donas 1363.6. Ekz se arĝent-enhava monero entenas 10g da arĝento, kaj la aktuala or-arĝenta rilatumo estas 80, do en or-ekvivalento estas 0.125g, tiam multiplikante per 1363, oni kalkulas, ke la monero valoras 170 spesojn.)

c. 50% (sed notu, ke antaŭ 1920 la fajneco estis 92,5%)

c. 20 spesoj (ĉar duonkrono nominale dekoblas sespencon; vi povas facile kompreni, ke kiam la monserio entenis arĝenton, tiam estis konstanta proporcia rilato inter la nominala valoro kaj la pezo – alie, la publiko sentus sin trompita.

Mi ne donos la ĝustan respondon por la lasta demando. Se vi nun ne scias, kiel kalkuli la respondon, tio signifas, ke vi nenion lernis de tiu mia testo kaj vi plene meritas resti viktimo de via ŝtato, kiu konstante senvalorigas vian monon. La sola fidinda mono estas nia internacia mono, la spesmilo, kies metalenhava valoro egalos por ĉiam sian nominalan valoron- kio estas la sola akceptebla kriterio por fidinda mono, kiel kredis niaj prauloj dum jarcentoj.

Ni tutkore dankas Terry Watts pro la interesaj kvizo kaj solvoj!

POR SPUREMULOJ!

En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni scias ĝis hodiaŭ malmulte aŭ preskaŭ nenion.

XXa enigmo

A) La redakcio serĉas **mezurojn + pezon**, por povi akurate priskribi la kvar medalojn!



B) Nekonata valormarko kun valoro“du steloj”. Kiu povas informi pri **la jaro kaj la evento?**



ASPEKTOJ DE NUMISMATIKO

Ekslibrisoj

A Retrospektivo



Ĉiu ajn kolektanto iam sentos la bezonon studi la objektojn de sia kolekto. Tre ofte tio implicas, ke ekestos dua kolekto kiel helpilaro, ekzemple konsistanta el libroj, revuoj, katalogoj kaj diversaj artikoloj, eĉ el la Reto, eble eĉ bindigendaj. Seriozaj kolektantoj de moneroj aŭ medaloj sufiĉe ofte havigas al si valoran numismatikan privatan bibliotekon. Tamen, rimarkeblas, ke el ili nur kelkaj havas personan ekslibrison aŭ librosignon tiurilate.

Tiaj librosignoj jam tiom longe ekzistas kiel la presarto mem. Ili preskaŭ samtempe aperis kaj estis kreitaj de famegaj artistoj kiel Albrecht Dürer, Lucas Cranach, Jost Amman, Hans Holbein k.a. je la fino de la 15a kaj la komenco de la 16a jarcentoj. Ili ksilografis ekslibrisojn por reĝoj, religiuloj, nobeloj kaj riĉaj burĝoj. Privata biblioteko tiutempe estis ege valora posedaĵo, nur havebla kaj montrebla por riĉuloj, kiel nuntempe Rolls Royce aŭ Rolex-horloĝo. Kompreneble por superblufi la konatulojn aŭ la servistaron! Krome nur tiaj uloj kapablis legi kaj skribi. Nu, nur ekde la komenco de la 16a jarcento oni povus mencii verajn ekslibrisojn. La latina termino *ex libris*, kun la nomo de la posedanto, signifas “el la libraro de ...”.

Pro la malrapida disvastigo de presitaj libroj, tamen multekostaj, sed pli ĉipaj ol manuskriptoj, la kvanto de libroposedantoj kreskis. Sekve ankaŭ la nombro de ekslibrisoj. Komence, ekslibrisoj montris la blazonon de la posedanto, ĉar ĝi anstataŭigis la nomon. Nobeloj kaj patricioj konis la reciprokajn blazonojn, do ankaŭ la nomojn. Jen tial klara paralelo kun moneroj, kiuj ankaŭ montris la blazonon de la komisiinto, kiu pregigis ilin.



Post kelkaj jarcentoj al la blazono tamen estis aldonita nomo, ĉar iompostiom ankaŭ malnoblaj klasoj sukcesis akiri librojn. Flanke de aŭ anstataŭ de nomo ol blazono regule estis aldonita devizo.



Nur en la 19a jarcento aperis aliaj bildoj aŭ ilustraĵoj. Baldaŭ venis la antaŭaĵoj de la moderna ekslibriso. Tiuj bildoj rilatis al iu eco aŭ posedo de la posedanto, kiel kastelo, la interna domaranĝo de biblioteko, iu preferata domhundo, intereso kiel ĉasbezonaĵoj, kolektaĵoj, moneroj aŭ medaloj, muzikinstrumentoj, eĉ komercaj ŝipoj, la dio Merkuro aŭ armiloj. Ekde tiam la eblecoj iĝis senlimaj kaj ofte referencis al temaj kolektoj.

B Numismatikaj ekslibrisoj

Ĉiuj ekslibrisoj kiuj montras temojn de numismatiko estas konsiderataj kiel numismatikaj ekslibrisoj. Kelkuloj limigas la temojn je moneroj, medaloj aŭ monbiletoj. Malpli rigida limigado permesas temojn rilate al ĝenerala numismatiko. La plej libera vidpunkto eĉ akceptas ekslibrisojn de (konataj aŭ famaj) numismatoj, sen numismatikaj bildoj. Ĉiu do rajtas mem decidi pri pli rigidaj aŭ liberaj limoj.

Jen listo de eblaj temoj (kiuj ofte meritas lokon en diversaj kategorioj):

- numismato mem (= la kolektanto aktiva)
- kolekto mem (monerŝranketo, monertirkesto, unuopaj moneroj ...)
- moner- aŭ medalproduktado (laborantaj monfaristoj, monerpremilo ...)
- papermono
- numismatikaj libroj
- monertrovaĵoj
- surskriboj, signoj kaj bildoj sur moneroj aŭ medaloj
- numismatikaj asocioj
- temoj koncerne valutkomercon, valutŝanĝon, ŝteliston, falsiston ...
- simboloj kiel monkesto, monujo, abundokorno ...
- mono en la lingvouzo aŭ heraldiko, kiel en fabeloj, proverboj ...
- monero kiel simbola referenco al numismatiko ...
- (kavaliraj) ordenoj
- famaj numismatoj
- ...



daŭrigota



La arbo de la vivo



Metamorfozo



Kreado



Krio



Duobla portreto

MEDALISTOJ

34 Bogomil Ĵivkov (°1946)

*“Pentristo, kiu havas sian arbon de la vivo,
devas esti certa, ke la fruktoj de la arbo estos eternaj.”*

Svetlin Rusev



“Ora” zamenhafa medalo de B. Ĵivkov

La skulptisto Bogomil Ĵivkov naskiĝis la 27-an de februaro 1946 en la urbo Pernik, Bulgario. De 1965 ĝis 1971 li studis en la Pentroarta Akademio en Sofio la fakon skulptarto ĉe profesoro Sekul Krumov.

Ekde 1976 li estas membro de la Asocio de Bulgaraj Pentristoj.

De 1977 ĝis 1987 sekretario de la filio de la Asocio de Bulgaraj Pentristoj en sia naskiĝurbo Pernik.

De 1992 ĝis 1996 li estis ĉefsekretario en la Centra Estraro de la Asocio de Bulgaraj Pentristoj.

De 2006 ĝis 2009 li laboris kiel sekretario de la sekcio “Skulptarto” en la Asocio de Bulgaraj Pentristoj.

Multfoje li estis membro de la direktoraro de Asocio de Bulgaraj Pentristoj kaj ekde 2020 li estas membro de la Centra Estraro de la sama asocio.

Sian kreaĵon principon Bogomil Ĵivkov esprimas per la vortoj: *“Sen la pasio de la fajro kaj la el ĝi ŝprucanta lumo la kreaĵoj estus senvivaj, ne disradius emocion kaj spiritecon. La fajro kaj la lumo estas la fortoj, kiuj materiigas miajn ideojn en la formojn de mia spirita mondo.”*

Li kreas monumentajn skulptaĵojn, statuetojn, malgrandajn plastikaĵojn kaj artplaketaĵojn.

En diversaj bulgaraj urboj estas monumentoj kaj bustoj de Bogomil Ĵivkov, dediĉitaj al famaj bulgaroj.

En la Nacia Palaco de la Kulturo en Sofio estas liaj plastikaĵaj kolonoj, dediĉitaj al la 1300-a datreveno de Bulgario.

En Sofio, je la komenco de strato “Pirotska” troviĝas lia monumenta skulptaĵo “La Arbo de la Vivo”, poezia fabelo pri la vivo, pri la amo, pri la harmonio inter homoj kaj naturo.

Li estas ankaŭ **aŭtoro de bareliefo de d-ro Zamenhof en la urbo Razgrad.**

Bogomil Ĵivkov havis multnombrajn memstarajn ekspoziciojn en Bulgario kaj eksterlande, i.a. en Germanio, Britio, Japanio, Aŭstrio, Slovakio kaj Malto.

Li partoprenis en reprezentaj ekspozicioj de la bulgara arto en Germanio, Francio, Svislando, Rusio, Britio, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Rumanio, Italio, Portugalio, Hungario, Belgio, Nederlando, Greklando, Turkio, Zimbabvo, Niĝerio kaj ankaŭ en skulptartaj simpozioj en Bulgario kaj Germanio.

Multnombraj estas la premioj, kiujn ricevis Bogomil Ĵivkov. Iuj el ili estas:

- unua premio en la Internacia Simpozio pri Ŝtonskulptaĵo – Bulgario, urbo Burgas, 1974;
- laŭreato de la Internacia Konkurso pri Statueto – urbo Budapeŝto, 1978;
- premio de la federacio por atletikaj sportoj de Hispanio en la internacia dujara konkurso pri sportaj temoj, sub la aŭspicioj de la Internacia Olimpika Komitato – urbo Barcelono, Hispanio, 1979;
- premio de la internacia dujara konkurso pri sportaj temoj, sub la aŭspicioj de la Internacia Olimpika Komitato – urbo Madrid, Hispanio – 1981;
- ora medalo de la Organiza Komitato de la Internacia Konkurso pri Skulptarto, dediĉita al Dante Alighieri – urbo Raveno, Italio, 1988.

Naciaj premioj:

- premio pri skulptarto de la Ministerio pri Kulturo, de la Nacia Artekspozicio en la urbo Sofio, 1975;
- premio pri skulptarto de la Nacia Artekspozicio en la urbo Pernik, 1983;
- premio de la Asocio de Bulgaraj Pentristoj je la nomo de Marko Markov por malgranda plastikaĵo, 1986;
- la granda premio de la urbo Pernik por prospero en la belarto, 1986;
- premio por skulptarto de la Bulgaraj Profesiaj Asocioj, 1987;
- premio de la urbo Sofio por prospero en la skulptarto de nacia artekspozicio en urbo Sofia, 1989;
- unua premio por skulptarto de la nacia konkurso “Handikapesprimo”, organizita de la fonduso Flandra-bulgara Forumo kaj Asocio de Bulgaraj Pentristoj, 1996.

Kreaĵoj de Bogomil Ĵivkov estas en diversaj galerioj kaj privataj kolektoj en Bulgario kaj eksterlande.

La ENA-redakcio tutkore dankas nian samideaninon, la pentristinon Maya Gorova, edzino de la medalisto, pro la detalaj kaj riĉaj informoj pri la vivo kaj la kariero de Bogomil Ĵivkov.

VALORMARKOJ & VALORBILETOJ

Kotizmarko SAT- membreco 1927/ 1928



Kotizmarko, gluita respektive en la tiurilatajn spacojn por la membreco de la jaroj 1927 kaj 1928. Membrokarto de la tria sektoro de la 20a budapeŝta distrikto Pesterzsébet. La kotizmarko (ruĝa, blanka kaj helverda) montras cirklon kun ruĝa fono kaj helverda Esperantostelo. Ĉirkaŭ la cirklo: "Sennacieca Asocio Tutmonda"; en la stelo la mallongigo "SAT". Sur la maldekstra paĝeto informoj pri la celoj de tiu organizo de esperantistoj-socialistoj.



HISTORIAJ ASPEKTOJ

Esperantaj insignoj

La unuaj esperantistoj meditis pri ideo, kiel trovi siajn samideanojn en diversaj urboj kaj landoj. Ankaŭ ili mem serĉis metodojn, por ke samideanoj povu identigi ilin kiel esperantistojn. Antaŭ iliaj okuloj estis vivaj ekzemploj ĉe kristanoj aŭ volapukistoj. Esperantistoj amase kaj volonte produktis objektojn kun la esperant(ist)a verda koloro, stelojn kaj skribojn. Aperis poŝtkartoj kaj poŝtmarkoj, leterpaperoj kaj kovertoj, kravatpingloj kaj broĉoj, kruĉoj kaj kuleroj, ĉampanoj kaj likvoroj, cigaroj, ĉapeloj, krajonoj kaj skribiloj, bombonoj kaj ĉokoladoj.

Certe esperantistoj faris esperantistajn insignojn. La unuaj insignoj estis produktitaj el kartono. Poste oni produktis ilin el kupro, bronzo, orita bronzo, arĝento kaj eĉ el oro.

En Ruslando la plej kapabla vendisto de E-insignoj estis Grigorij Vasiljeviĉ **Rjabinin**, ĉar li laboris en Ŝtata Banko en Ĥarkov. Li proponis insignojn ekde la 1893a jaro.

En numero de “Esperantisto” (15.01.1894/1(49), p.7) ni legas: “S-ro A.Martakov skribas al ni: ‘Mi petas vin sciigi per nia gazeto “Esperantisto” al la amikoj de nia afero, ke s-ro K.Fabergé en Moskvo (kortega juvelisto, Kuznecki Most, domo de San Galli) preparis por esperantistoj la sekvantan signon: ringo por malgranda fingro, el oro, kun kvinpinta stelo el senbrila oro. Ĉirkaŭ la stelo estas la surskribo: “Lingvo Internacia Esperanto, 1887 jaro” per oraj literoj sur verda emajla kampo. La mezo de la tuta longo de la ringo estas verda, emajla. La laboro estas ne fabrika, sed artista. La kosto de la ringo, se oni aĉetos 2-3 pecojn, estas 13 r. 50 kop., kaj se oni aĉetos pli ol 15 pecojn – tiam 12 rublojn. Tiu ĉi ringo estas vendata nur al esperantistoj; tial, oni devas skribi en la lingvo Esperanto...”.

En 1910, kiam L.Zamenhof venis al Peterburgo, por saluti la Unuan Tutrusian E-Kongreson la peterburgaj esperantistoj donacis al li oran insignon.

Pri la kvanto de E-insignoj ni povas juĝi laŭ informo aperinta en “La Ondo de Esperanto” (1910/3, p.7): “...Konata dresdena firmao *Glaser & Sohn*, komencinta antaŭ kelkaj jaroj produkti esperantistajn insignojn, informas en sia raporto, ke ĝi dum kvar jaroj vendis entute 60 000 da tiaj insignoj. Se konsideri, ke tiaj firmaoj, produktantaj insignojn, sur la ter globo estas kelke, rezulte estas brila atesto de la disvastigo de Esperanto dum la pasintaj jaroj...”

En Sovetio estis nur unu sola persono, kiu profesie produktis E-insignojn. Temas pri Rimantas-Stanislovas **Endriulaitis**¹ (03.07.1938, vil. Ŝimkaiĉiai, distr. Jurbarkas, – 2020). Litovio. Li naskiĝis en metiista familio. La patro estis meblisto kaj la patrino kudristino.

Endriulaitis en 1960 finis la Terkulturatan Teknikumon de Smalininkai. Fine de la 1960-a jaro li ekloĝis en Vilnius kaj eklaboris kiel supera inĝeniero en la akcia kompanio *Sigma*. Li

¹Eksjunecano. *Majstro de insignoj // Litova Stelo*, 2008/4 (182), p.16-17.

esperantistiĝis en 1966. En 1967 li finis E-kurson kaj iĝis membro de E-klubo kaj vizitadis E-aranĝojn.

Havante favorajn kondiĉojn en la uzino, li komencis kiel la unua en Sovetio produkti E-insignojn. Per la insignoj Endriulaitis propagandis Esperanton kaj li disvastigis ilin dum E-aranĝoj. Dank'al la helpo de Povilas Jegorovas, Vytautas Ŝilas k.a. insignoj de Endriulaitis atingis la eksterlandon: ili nun estas troveblaj en la muzeoj de Vieno, UEA, Roterdamo, diversaj E-kluboj. De 1967 li partoprenis preskaŭ en ĉiuj BET-oj kaj en 1992 en SAT-kongreso.

Post restarigo de la litovia sendependeco ekestis ebleco libere veturi eksterlanden. Endriulaitis partoprenis kaj disvastigis siajn E-insignojn en la 76a, 77a, 78a, 80a, 81a, 83a kaj 84a UK-oj de Esperanto. La elspezojn de la vojaĝoj al kongresoj li kovris, vendante E-insignojn. Al la UK en Bergen li veturis kun grupo per ŝipo, al Vieno – memstare, al Valencia, Tampere, Prago, Montpeliero kaj Berlino – organizite kun grupoj el Litovio.

Dum 41 jaroj (1977-2008) Endriulaitis produktis ĉ. 35 000 insignojn de 350 specoj kaj krom tio ĉ. 15 000 insignojn de ĉ. 150 specoj, destinitajn por jubileoj de diversgradaj lernejoj, institucioj, uzinoj, *Sajudis*, sendependeco de Litovio k.a. Li plenumis mendojn, por produkti insignojn el tuta Sovetio. De 1999 li ne plu laboris en la uzino, estis pensiulo kaj ne povis tiam amplekse okupiĝi pri produktado de insignoj. Li mortis en 2020 .

Insignoj estas produktataj por internaciaj kaj naciaj Esperanto-asocioj: UEA kaj SEU; por profesiaj aŭ partiaj unioj: IFEF kaj socialistoj; por regionaj, urbaj, aŭ klubaj skaloj; dediĉitaj al E-Kongresoj, tendaroj, datoj, konferencoj aŭ personoj; aluminiataj, dumetalaĵoj aŭ plastaĵoj; rondaj, kvadrataj, kvinstelaj, konusaj, rombaj; kun esperantaj aŭ kun naciaj flagoj.

Anatolo Sidorov (Sankt-Peterburgo, novembro 2021).



Ni petas niajn legantojn eventuale sendi siajn rimarkojn, konsilojn kaj informojn pri (al si nekonataj) aspektoj ilin al:
anasido@gmail.com

La redakcio de ENA tutkore dankas Anatolon Sidorov, nian novan kaj 167an individuan membron, pro la ege interesa artikolo kaj la bildaro pri diversaj esperantaj insignoj. Daŭrigo estus dezirinde kaj tre bonvena!

TERMINARO

Alfabeto listo (36)

brasaĝo: *salajro de monfarejestro*

bronza putro: *reago de kuproklorido (CuCl), ankaŭ nomata bronza putro. Ĝi formas helan ĝis bluverdan pulvoran tavolon sur bronza monero aŭ medalo. La pulvoro facile falas de la objekto.*

brunigi: *poluri stampitan moneron per brunigŝtalo. Tiu procezo tamen forigas detalojn kaj tial reduktas la kondiĉon de monero aŭ medalo.*

diametro: *dimensio de la sekco de monero, preskaŭ ĉiam indikata en milimetroj*

duliono: *malbonkvalita arĝenta aŭ kupra alojo kun, ekzemple, nikelo aŭ zinko, kiu similas arĝenton (sed ne enhavas arĝenton). Komparu ankaŭ kun la esprimo “deklari triliono” = deklari nevalida.*

duobla streko: *monero en kiu la sama marko estis stampita dufoje, tiel ke montriĝas “ombro”*

enhavo: *la relativa proporcio de la plej ofta (valora) metalo. Orenhavo ankaŭ estas esprimata en karatoj, kiel 24 karatoj estas 100%. Arĝenta enhavo estas kutime esprimata per milo. Ekzemple, 925/1000 arĝento (sterlinga arĝento). Puraj oro kaj arĝento estas tro molaj por esti uzataj por moneroj, medaloj kaj juveloj. Tutaj procentoj estas uzataj por aliaj metaloj.*

escisto: *fakulo, kiu kontrolas la gradon de metalo kaj monero. Kutime nomumita de la monfarejestro.*

fantoma stampado: *vidu > duobla streko*

fidata mono: *mono kies nominala valoro ne baziĝas sur la pezo kaj enhavo de valormetalo, sed sur leĝo, do sur fido al ŝtato.*

forna nombro: *specifo de la marko aŭ de la stampado, kutime uzata sur orientaciaj moneroj*

ĝisdatigo: *provo revivigi eluzitajn partojn de monero aŭ medalo, ekzemple per regravuro de detaloj.*

kompetenteco: *determino kaj taksado de monero aŭ kolekto far fakulo.*

markado: *monero stampata per originalaj markoj en malsama metalo. Ili do ne estas destinitaj por la oficiala cirkulado.*

unuflanka: *monero aŭ medalo kun unu flanko lasita neprilaborita.*

EL LA GAZETARO

Rakonto

Petro Desmet

Kiom peza Numismatika Impulso povas esti!?!

Dum esplorado pri esperantisto, germano sed loĝanta en Nederlando, kiu estis treege aktiva en la jardeko antaŭ la dua mondmilito, Carl Franzmann, mi akiris informojn, kiuj iel rilatas numismatikon. Carl aŭ Karlo, ĉirkaŭ 1930, fondis muzeon en Groesberg (apud Nimego), en kiu li ekspoziciis lokajn trovitaĵojn, inter kiuj estis ankaŭ malnovaj moneroj. Ĉe la fino de la milito estis seriozaj bataloj en tiu regiono - estas ja la regiono de la ne tro sukcesa paraŝutista invado, ĉe la Nimega ponto! Kaj nun ni lernis, ke tiam tie okazis iu ŝtelado, kiu multajn jarojn poste, en 1980, rezultis en gazetartikoleto. Mi invitas al legado: La teksto estas partraduko (traduko kun ellaso de iuj frazoj) de artikolo el Nederlanda ĵurnalo "La Gelderlandano" el 1980.

Moneroj revenis, sed kie estas la muzeo?

La 21an de junio 1980, dum junulara interŝanĝo, Judith Goossens el Berg kaj Terblijt havis kontakton kun usona veterano de la 82a Airborne Division. Li rakontis abunde pri siaj travivaĵoj dum la milito, precipe pri tio, kion li spertis post sia surteriĝo en "Grusbeko" la 17an de septembro 1944. Je la fino de sia rakontado li hezite konfesis ke li, dum militpaŭzo, vizitis tie iun muzeon, el kiu li ŝtelis kolekton da malnovaj moneroj, kaj ke li jam dum tridek jaroj sentis pri tio konscienciproĉon. Li deziris liberiĝi de tiu sento kaj petis al Judito, ke ŝi kunportu la monerojn al "Grusbeko", por redoni ilin al la iama posedanto. (...) La militpredo konsistas el 355 precipe antaŭmilitaj germanaj, francaj, italaj, nederlandaj, rusaj, belgaj, danaj kaj britaj moneroj kaj serio da romiaj moneroj. (...) Judito diras, ke ŝi ne havas eĉ etan ideon pri la valoro de la moneroj, kaj ŝia patrino diras ke la "kolektaĉo" prefere kiom eble plej rapide estu for el ŝia domo. Nur... kien? "Grusbeko" apud Nimego rapide kompreniĝas kiel "Groesbeek", sed tie neniu scias pri iu ajn muzeo! Ĝis G. G. Driessen, prezidanto de la "Asocio pri Folkloro" aŭdas pri ĝi kaj tuj rakontas, ke nepre temas pri la "Heimat-muzeo" de Carl Franzmann. (...). La urbestro de Grusbeko, s-ro Van Gils, nun esploras kion fari plie. Kompreneble la komunumo ŝatus konservi la monerojn, sed unue oni devos esplori, ĉu ankoraŭ ekzistas heredantoj de Franzmann kaj ĉu ili eventuale volas transdoni la monerojn al nia arĥivo", tiel skribas "La Gelderlandano" en 1980. Nun, 25 jarojn poste, ĉar ni malkovris, ke Franzmann liberigis la muzeon en 1937, estas klare, ke ne tie la moneroj estis trovitaj! La moneroj, kunportitaj el 1944, nepre devas veni el alia loko. Tion pravigas la fakto ke Carl transloĝigis sian kolekton al la "Pensiono Grusbeko". Verŝajne en la bazaj lokoj, pro kio la ejo povis esti vidita kiel muzeo, precipe se vidita de ne-tute-konscia paraŝutisto. Car Bill rakontis en 1980 ankaŭ ke, kiam li prenis la monerojn, li estis ebria. Antaŭe li, kune kun kelkaj kunbatalantoj, trovis alkoholaĵojn en iu aŭ alia domo. Poste li mem, duonebria, enkuris la "muzeon" kaj ebrie-estanta estis preninta la kolekton. Ĉar lia stato estis duonkonscia, kaj ĉar ĝi verŝajne okazis en duonlumo aŭ nokte, oni povas kompreni ke li vidis

muzeon. Estas verŝajne, ĉar la drinkado okazis sufiĉe proksime, preskaŭ certe en la strato Urbestro Ottenhoff, kie estis komercejo kun alkoholfarejo de la komercisto Th. van Houten, kiu, kiel la sola en la vilaĝo, havis ankoraŭ kelkajn botelojn en rezervo. Kvankam li bone estis kaŝinta sian stokon, ĝi tamen de la soldatoj estis trovita kaj konsumita. Elirante Bill certe estis enirinta la "muzeon", post centoj da malfortaj paŝoj. Se tiu klarigo estas ĝusta, tiam finfine la moneroj estas de Carl Franzmann. Iel ajn, por Franzmann ja tute ne gravas, ĉar finfine li ja tamen estus perdinta ĉion. Post la usona vizito la konstruaĵo estis vizitita de kanadaj kaj britaj soldatoj kaj post la milito ĉiuj posedaĵoj de Karlo estis konfiskitaj de la Ŝtato, pro kio la geedzoj C. Franzmann-Molenkamp ne plu revenis al Grusbeko.

Moneroj duan fojon perdiĝis

Ĉar ni iĝis scivolemaj pri la moneroj, ni vizitis la ĉefon de la komunuma arĥivo, sed tiu estis absolute senscia pri la afero. Poste, la 6an de majo 2005 ni, telefone, petis informojn ĉe eksurbestro E. van Gils, kiu, 25 jarojn post la faktoj, senhezite rakontis, ke li tiam transdonis la monerojn al notario Th. van der Heide en Beek. Tiu zorgis taksadon, kiu rezultis en la proklamo, ke la moneroj estis senvaloraj; kio poste okazis kun la kolekto, tion eksurbestro Van Gils tute ne plu memoris. La intertempe ankaŭ pensiiĝinta notario Van der Heide sciigis, post nia peto, ke li absolute neniam havis iun rilaton kun tiuj moneroj, kaj laŭ lia scio neniam ili estis en lia kontoro. Por esti erta, li informiĝis ĉe eksoficistino, kiu ankaŭ havis neniun memoron pri la moneroj. Por klopodi nenion lasi neesplorita, ni ankoraŭ petis informojn de du eksoficistoj de la komunumo. Malgraŭ ilia tiama ĉefpozicio ili certe ne estis iam ajn petataj pri tio, kion oni faru kun la kolekto. Ni denove petis la eksurbestron, sed li restis ĉe la unuaj deklaroj. Li rekonis ke, por eviti tro da embaraso, li tute sola estis traktinta la aferon. Li bedaŭris, ke la moneroj perdiĝis. Kun li, ankaŭ la redaktinto de tiu ĉi teksto bedaŭris, ke li mem, kiu tiam estis prezidanto de la Folkloro-Asocio en 1980, neglektis serioze sekvi la evoluon de la afero. Eble li ne trovis dece ĝeni la relative novan urbestron E. van Gils enoficiĝis en 1979. Bedaŭrinde oni poste, kiam Van Gils estis konata kiel amikeca urbestro, ne plu klopodis informiĝi pri ĉio, kaj sekve... la moneroj perdiĝis!

Klare estas do, ke la numismatika trezoreto pezis sur la konscienco de la usonano, sed la artikolo ankaŭ sugestas... ke ne al ĉiu tia pezo estas troa!



Ni tutkore dankas nian belgan samideanon Petro Desmet pro la interesa kaj amuza historia raporto... kun propra moralinstruo!

REPOŝTO

de vi por ni!

Reagoj kaj konversacioj

13.10.2023 17:10

Kara Jozefo,

Jen mejlŝtono por ENA: la kvara numero de la deka jarkolekto. Mi esperas, ke vi volas ankaŭ provlegi ĝin por konservi la kvaliton de nia revuo.

Dankante vin pro viaj senĉesaj penado kaj fidelo mi nun sendas al vi per Wettransfer la preparitan numeron por lasi vin provlegi ĝin.

Amike kaj numismate,

Bert

16.10.2023 8:33

Kara Bert,

rondaj jubileoj estas ĉiam pli brilaj ol simplaj datrevenoj. Mi povas nur ripeti, kion mi jam foje diris, ke vi trovis tian niĉon en nia kulturo, kiu estis ne tro prizorgata. La faklingvaĵo estas tre grava parto de ajna lingvo, ĝi ja kompletigas la kulturon de la koncerna lingvo. Do via longjara agado estas tre necesa, laŭdinda kaj gratulinda. Plej koran gratulon al vi kaj al la kontribuantoj de nia revuo!

Revenante al la revuo permesu al mi du rimarkigojn:

- 1) Mi jam proponis uzi la Esperantan literumilon de LibreOffice, por elsarki almenaŭ mistajpojn. Per tio vi multe plifaciligus mian kontrollaboron.
- 2) Pri Eger: mi konjektas, ja certe ne scias, ke temas pri la ĉeĥa urbo Cheb, kun germana nomo Eger. La alparolo kaj la surskribo estas germanaj. En la hungara Eger neniam ekzistis Verein Deutscher Esperantisten. Kaj kiel vi scias, tiutempe Ĉeĥio apartenis al Aŭstrio-Hungario, kaj en Ĉeĥio loĝis multaj germanoj. Kvankam troviĝas ankaŭ en Hungario urbo Eger, sed kun hungara loĝantaro. Krome la poŝtmarko havas germanan surskribon, la hungariaj poŝtmarkoj havis ankaŭ tiutempe hungaran surskribon. Krome Heller neniam estis hungara monero, ĝia hungara ekvivalento estas fillér.

Do verŝajne temas pri la ĉeĥia Eger, nuntempe Cheb.

Mi sendos la revuon per WeTransfer.

Kun amikaj salutoj kaj plej koraj gratuloj!

Jozefo



18.10.2023 19:28

Multan dankon, Bert.

Alfred Schubert



18.10.2023 20:13

Miaj plej sinceraj bondeziroj iras al Esperanto-Numismatika Asocio pro regula kaj daŭra laborado por Esperanto dum konsiderinda periodo.

Simple daŭrigu tiel kaj ne nur la nepoj sed ankaŭ la samtempuloj vin benos.

Renato Corsetti



18.10.2023 20:23

Farite: <https://hdl.handle.net/11013/7098>

Amike,

Ana Manero

[Biblioteko Juan Régulo Pérez](#)

biblioteko@esperanto.es



19.10.2023 01:03

Saluton Bert

La nova numero troviĝas en [ena-j10n4_202304.pdf \(alcl.be\)](#)

Kun amikaj salutoj,

Albert Claesen



17.10.2023 23:40

Estimata S-rino Martinelli,

kun ĝojo mi hodiaŭ denove bonorde ricevis la novan numeron de LF. Multan dankon!

La temo de mia letero tamen estas peto. En la revuo de ENA, "Esperanta Numismatiko" mi hazarde relegis malnovan artikolon pri la belega arĝenta Zamenhofmedalo de nia Civito, sed mi konstatis, ke mankas al mi la nomo de la medalisto kaj informoj pri lia/ ŝia artista kariero.

*Se vi povus havigi al mi sufiĉe da **informoj** pri li/ ŝi kaj **foton**, mi kapablus verki interesan artikolon por la rubriko “Medalistoĵ” de la sama revuo, kiun mi poste sendus al vi, se vi akceptas.*

Mi tutkore antaŭdankas kaj salutas vin civitane,

Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio

19.10.2023 10:56

Kara civitano,

Mi plusendis vian mesaĝon al la produktinto de la medalo, kaj esperas ke li baldaŭ respondos, ĉu rekte al vi, ĉu al ni. Ja ni kompreneble konas grandlinie lian karieron, sed pli precizajn aktualajn detalojn nur li povas doni.

Ĉu vi bonvolos resendi al mi vian siatempan artikolon por ke ankaŭ mi relegu ĝin sen (ĉiam pli longa ol antaŭvideble) komputila serĉado?

Amike kaj civitane,

Perla

20.10.2023 15:30

Kara samideano,

dankon pro via kunlaboro helpe al ENA.

Aldone mi sendas la de vi petatan artikolon kun priskribo kaj foto en Moneroj & Medaloj de la unua numero de la sesa jarkolekto de la ENA-revuo.

Tiuokaze mi petas vin konsideri la senpagan aliĝon de nia Civito al ENA kaj ĝia revuo, kiel 26a asocia membro (ni havas krome 165 individuajn membrojn en 44 landoj). Ni aktuale festas jubileon okaze de la deka jarkolekto!

Amike kaj civitane,

Bert



20.10.2023 0:44

Kara Bert,

Koran dankon! Jam unua supraĵa tralego haltigis min en pluraj paĝoj de la ĉiam interesege ENA-revuo.

Mi en aŭgusto estis ĉe Elda kaj pasigis bonegajn tagojn kun ŝi kaj kara Pino.

Amike,

James Rezende Piton

20.10.2023 17:04

Kara James,

Multe plezurigas min viaj reago kaj pozitivaj vortoj. Multan dankon!

Mi intencis ankaŭ partopreni en la UK de Torino, sed Vivi fartis tiam malbone kaj dume estis operaciita kaj ricevis artefaritan genuon.

Amike kaj numismate,

Bert



20.10.2023 10:38

Dankon pro la revuo. Kiel kutime, mi sendos ĝin al esperantistoj.

En ĉi tiu numero mi trovis la medalon de la 78a Universala Kongreso de Esperanto 1993 (unuflanka medalo kun pendoŝnuro), en Esperanto Libraro ni havas la saman kaj ankaŭ kvin aliaj de sama speco:

- Varsovio 1987,
- Bergeno 1991,
- Kalifornio 1998,
- Esperantotur Bydgoszcz,
- Ludwik Zamenhof.

Mi salutas vin,
Maria Niemyjska
Bjalistoko

20.10.2023 16:58

Kara Maria,

tutkoran dankon pro la reago kaj nepre pro la sendo de nia revuo al mi, mi ne scias kiom da esperantistoj!

Dankon ankaŭ pro la listo de murmedaloj. El tiuj mi ŝatus ricevi de vi, se eble, foton kaj mezurojn (vidu la ekzemplon en la lasta revuo) de la murmedalo de Esperantotur Bydgoszcz, kiun mi poste priskribos en la venonta numero! Mi supozas, ke vi ne konas la nomon de la artisto-medalisto?

Korajn salutojn al vi kaj aliaj samideanoj!!!

Bert

Por ENA



20.10.2023 11:07

Bert,

Okaze de vizito (1994) al la tiama Hispana Esperanto-Muzeo mi eksciis pri medalo kiun ricevis la edzino de la fondinto de la muzeo. Mi nur nun ekscis ke estas tuta serio de honorigitaj sinjorinoj.

Serĉante en mia dokumentaro mi neniun aldonan informon trovis. Rete mi trovis la aldonitan nomliston en kiu Teresa Massana estas menciita; ŝi nur antaŭ nelonge mortis. Mi ne scias pri kiu temas; eble estas elstaraj virinoj kiuj meritas stratnomon aŭ ion similan. Mi trovis kvar versiojn de la nomo!

Eble estas kataluna abonanto de ENA-revuo kiu kapablas kompletigi la retpaĝojn https://eo.wikipedia.org/wiki/Muzeo_de_Esperanto_de_Subirats kaj eĉ verki plian paĝon pri la Premio Klara Silbernik. Estas artikolo pri la premio je https://eo.wikisource.org/wiki/Sekso_kaj_Egaleco/Numero_3/Kompleta_teksto.

Roland

20.10.2023 16:49

Roland,

Multan dankon pro la enhavoriĉaj informoj. Mi supozas ke vi tiam ne povis foti la medalon...

Bert



22.10.2023 13:22

Kara Bert,

Denove mi surpriziĝis pro la multnombraj sciindaĵoj rilate numismatikon kaj la historion de Esperanto.

Eble mi revas, sed post dekjara aperado mi pensas ĉu ne indus eldoni libron kun la enhavo de tiuj retaj revuoj.

Ĝi vere estus trezoro en si mem.

Ĉiuokaze, gratulojn pro via grava laboro.

Amike,

Katja Lödör

22.10.2023 18:21

Kara Katja,

Leginte vian komenton, mi almenaŭ havas la impreson, ke mi jam iom atingis la celon kiu estis mia deirpunkto en 2013: montri al numismatoj kaj aliuloj, en kaj ekster la Movado, ke Esperantujo posedas trezoron - bedaŭrinde neglektita de historiistoj - de ne nur kolektindaj sed nepre pristudendaj numismatikaj artefaktoj. Mi nun estas certa, ke la 167 moneroj kaj medaloj kaj aliaj numismatikaj objektoj jam priskribitaj kaj la 30 ankoraŭ enigmaj ekzempleroj estas nur la pinteto de iu glacimonto. Nemalhavebla estas tiu trezoro por plejeble komplete skizi la historion de Esperanto kaj de la aktivaj esperantanoj.

La origina celo de la revuo estis ja kompili materialon por verki la unuan tiuteman katalogon kaj la unuan terminaron en la historio de la Internacia Lingvo. Jen do la projektoj por la venontaj jaroj. Entuziasmaj provlegantoj estos evidente ege bonvenaj!

Amike kaj numismate,

Bert



24.10.2023 16:41

Kara Bert,

la ENA-revuo estas vera trezoro de interesaĵoj el diversaj kampoj de homa scio tra okulvitroj de numismatiko!

Multan dankon kaj saluton el Kroatio!

Velimir Piškorec

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

25.10.2023 18:08

Koran dankon pro la sendo!

Mi ĝin presos, sed antaŭ ol tion fari, mi scivoleme, ĵetis rigardeton al ĝi.

Ho, kia surprizo! Eĉ mia nomo estas inter la "grandaj damoj"! Kaj tion ĉi absolute ne meritas, sed tamen mi fieras pro via granda amikeco, kiu instigis vin apudmeti mian nomon kune kun tiaj eminentulinoj!

Mi kredas, ke tio ĉi estis mia plej granda donaco ricevita iam ajn en nia Esperantujo.

Se iam mi havos eblon, mi farigos medalon al vi, por ke ĝin vi povu ĝin paradi kune kun viaj unikaĵoj numismatikaj!

Amike, kaj gratulojn pro via dekunua jarkolekta atingo!

Ĉiam antaŭen, mia kara Bert! Rekte kuraĝe kaj ne flankiĝante!

Brakumon al vi kaj via Vivi, la plej brava kompostisto de nia E-mondo!!!

Elda Dörfler

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

25.10.2023 21:23

Lieber Bert!

Vielen Dank für Esperanta Numismstiko 2023/4.

In der ganzen Woche von 9. -15. Oktober war ich in Florenz, wo das FIDEM - Kongress stattfand.

Natürlich traf ich auch Paul Huybrechts mit seiner milden Frau und vielen guten Freunden aus der ganzen Welt.

Mit herzlichen Grüßen

Jānis.

FIDEM - Ausstellung in Biblioteca Nazionale.

Lettlands Exposition. 15 Autore, 25 Medaillen.



Medaillenkünstler Lettlands.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

15.11.2023 11:59

Kara kaj estimata Bert,

mi esperas, ke vi fartas bone kaj pasigas agrablan aŭtunon. Kun granda intereso ni regule legas la revuon "Esperanta Numismatiko,,. Ĉu ĝi ankaŭ presite aperas aŭ nur rete?

Amikajn salutojn kaj bondezirojn,

Bernhard

Mag. Bernhard Tuidler

Teamleiter

Sammlung für Plansprachen und Esperantomuseum

Österreichische Nationalbibliothek

Palais Mollard, Herrengasse 9, 1010 Wien

Postadresse: Josefsplatz 1, 1015 Wien

Tel.: +43 1 534 10-731

bernhard.tuidler@onb.ac.at

onb.ac.at

16.11.2023 10:22

Kara amiko Bernhard,

Agrable estas ricevi de vi vivsignon! Jes, malgraŭ nia aĝo ni sufiĉe bone fartas. Espereble ankaŭ vi kaj la viaj!

Por ebligi senlime senpagan membrecon, ni de la komenco decidis sendi la revuon nur rete, tamen kun la ebleco kaj rajto simple elŭti ĝin per la retadreso frali@mail.de de nia retestro Frank Merla (Germanio), kie ĉiuj aperintaj numeroj estas elŭteblaj.

Permesu demandi kial vi petas tiun informon. Ĉu estas interesuloj kiuj deziras surpaperan version?

Mi uzas la okazon por peti vian helpon koncerne medalon. Temas pri medalo de la Premio Klara Zilbernik, de kiu mi havas nur fuŝan bildon en broŝuro de Hans Jankowski. Vane mi serĉis (bonkvalitan) fotojn de tiu enigma medalo.

Antaŭdankon, salutojn kaj bondezirojn de

Bert

17.11.2023 11:53

Kara Bert,

multan dankon pro la informoj.

Mi demandas, ĉar ni ankaŭ kolektus kaj tiam katalogus Esperantan Numismatikon, se ni havus ĝin papere en la kolekto.

Mi bedaŭras, sed ni ne havas ekzempleron de la medalo en la Esperantomuzeo. Se ni trovos bildon de ĝi en unu el la periodaĵoj, kiujn ni konservas, mi tuj sciigos vin!

Korajn salutojn kaj agrablan semajnfinojn,

Bernhard

17.11.2023 12:27

Kara Bernhard,

Mi supozas, ke surpaperigi la revuon ne estos problemo. Krome bona projekto por disvastigi numerojn.

Dankon pro via intenco spuri por mi kaj ENA.

Amike,

Bert



16.11.2023 23:13

Saluton, Piet,

kun granda intereso mi legis en "Horizontaal" la artikolon pri la multaj meritoj de nia baldaŭ centjara samideana "monumento" Gregoir. Kiel finredaktoro de "Esperanta Numismatiko" mi do ne povis ne proponi la kreadon kaj eldonon de promerita medalo honore al li.

Krome, laŭ miaj scio kaj bedaŭro, FEL ĝis nun neniam en sia historio okazigis la eldonon de propra medalo por honori eventojn rilate al ĝiaj propraj ekzisto kaj agado. Do jen taŭga okazo por kunigi du projektojn en unu memormedalo!

Por ŝpari monon kaj tamen sukcese realigi tian medalon ekzistas diversaj strategioj, kiel uzi antaŭmendon kaj antaŭpagon (je limigita dato) por eviti financon problemon kaj povi mendi konkretan kvanton de ekzempleroj jam pagitaj. Sekve trovi en sufiĉe granda urbo kiel Antverpeno aŭ Kortrejko prezmodestan medaliston kaj laste sed ne balaste, elekti metalon ne tro multekostan, evidente depende de la antaŭe decidita buĝeto.

Por bildoj kaj surtekstoj de ambaŭ flankoj mi volonte kunlaborus, priskribante (sed ne desegnante!) proponojn, sed evidente FEL havu la rajton mem decidi kaj elekti propran koncepton.

Ĉiel, tute je viaj servo kaj dispono mi salutas vin

samideane kaj amike,

Bert

19.11.2023 11:01

Saluton Bert,

Hieraŭ dum Aparta Ĝenerala Kunsido de FEL mi surtabligis vian proponon krei meritmedalon honore al Gregoir.

Mi volas sciigi al vi ke ne estis multe da entuziasmo pri via ideo. La ĉefa argumento kiun mi aŭdis estas ke Gregoir estas blinda kaj ke li do mem ne "ĝuos" tian donacon. Alia argumento de iuj (inter alia mi) estas ke meritmedalo estas iom "eksmoda". Mi imagas ke vi tute ne konsentas pri tio, vi povas reagi kompreneble.

Resume neniu pretas kunlabori al la realigo de meritmedalo.

Ni ja intencas krei "aŭdiolibron" kun gratulmesaĝoj prononcitaj de - de Gregoir konataj - voĉoj. Mi ne scias kiomgrade vi persone konis Gregoir sed ankaŭ via voĉo povus aperi en tiu aŭdiolibro.

Mi hodiaŭ ankoraŭ dissendos retmesaĝon al diversaj personoj kun invito kunlabori en tiun "projekteton" kaj klarigo pri kio mi specife atendos kiel kontribuon. Vi estos unu el la destinitoj.

Amike,

Piet

19.11.2023 11:43

Saluton gesamideanoj,

iom eksmoda eble, sed tamen "eterna", (kontraŭe al "aŭdiolibro") kaj eĉ tuŝebla kaj priskribebla por blindulo.

Tamen, FEL decidis, kiel mi jam skribis!

Sukceson pri via propra iniciativo!

Numismate kaj samideane,

Bert



19.11.2023 2:36

Bonan tagon, Bert!

Mi konsentas aliĝi al ENA.

Anatolo SIDOROV.

19.11.2023 15:02

Saluton kara samideano!

Multan dankon pro via membriĝo. Mi ĝojas bonvenigi vin kiel 167an individuan membron de ENA. Vi estas membro de la Rusia Esperantista Unio, ĉu ne?

Vi rajtas kaj povas, se vi volas, ankaŭ elŝuti la jam aperintajn jarkolektojn. La novaj numeroj aperos je la fino de januaro, aprilo, julio kaj oktobro. Se vi havus problemon elŝuti la antaŭajn numerojn, bonvolu kontakti min. Vi ilin trovas tiel:

Iru al Google kaj tajpu: <http://ena.frali.bplaced.net>

Vi ricevas: Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Iru suben ĝis la tabelo kun ĉiuj aperintaj numeroj. Klaku sur la numeron kiun vi volas konsulti kaj/aŭ elŝuti!

Amike kaj numismate,

Mag. Fil. Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA) Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

Fakdelegito pri numismatiko

19.11.2023 18:27

Bonan tagon, kara Bert.

Dankon, pro la ligilo al arkivo de "EN". Mi kopiis ĉiujn numerojn. Dum libera tempo mi trarigardos la numerojn.

Dankon!

Jes, mi estas membro de Rusia E-Unio.

Amike, Anatolo.

19.11.2023 19:52

Kara Anatolo,

Dankon pro via rapida kaj entuziasma reago.

Padonon, ke mi nun senceremonie jam petas vian helpon. Temas pri la fakto, ke post dek jardekoj mi trovis nur malmultajn rusiajn/sovetiajn esperantajn medalojn. Tamen mi konstante kompiladas medalojn por kapabli baldaŭ eldoni la unuan numismatikan katalogon en la historio de Esperanto.

Esperable vi konas la rektan vojon en via lando por informi min pri nekonataj tipoj kaj ekzempleroj.

Mi evidente antaŭdankas kaj salutas vin

Amike kaj numismate,

Bert

20.11.2023 3:46

Bonan tagon, kara Bert.

Bedaŭrinde mi ne estas kompetenta pri medaloj emisiitaj en Sovetio aŭ en nuna Rusio. Almenaŭ mi pri tio ne aŭdis. Estas ŝanco ke iu emisiis private en limigita kvanto, tamen ĝi ne estas fakto, sed supozo.

Mi interesiĝis pri E-insignoj. Por via scio mi sendas mian artikolon pri la insignoj. Ukrainio en 2007a jaro emisiis medalon dediĉitan al Vasilij Eroŝenko.

Amike, Anatolo.

21.11.2023 18:09

Saluton, kara Anatolo,

multan dankon pro viaj rapida reago kaj sendo de interesa artikolo pri insignoj, belege ilustrita. Ĝi certe aperos en la januara numero de 2024.

Ne gravas, ke vi povis nur informi pri la medalo por Eroŝenko. Ni jam priskribis ĝin, kion vi spertos spuronte en malnovaj numeroj, mi esperas kun ĝojo!

Amike kaj numismate,

Bert

05.12.2023 6:54

Kara, Bert!

Vi skribis, ke metos mian artikolon pri insignoj en januara numero de ENA. Mi petas aldoni mian E-mail por eventualaj rimarkoj, konsiloj kaj informoj, ne konataj de mi. Ankaŭ mian foton.

Amike, Anatolo.

14.12.2023 18:20

Kara Anatolo!

Pardonu pro la prokrasto de mia reago. Mi estis malsana...

Mi tamen jam aldonis viajn adreson kaj foton al la artikolo por januaro!

Kiel fakulo pri insignoj, ĉu vi eble iam povus verki artikolon pri la influo de moneroj kaj medaloj koncerne la aspekton de multaj insignoj. Ĉu ili historie estas parencoj?

Antaŭdanke kaj amike,

Bert



03.12.2023 18:13

Estimata Sinjorino, kara samideanino,

hazarde mi trovis en la reto tri bildojn de atesto pri honormedalo por bulgara meritulo, probable el 1987, kiujn mi aldone kunsendas.

Kiel finredaktoro de "Esperanta Numismatiko" mi petas vian helpon por informi min aŭ havigi al mi la retadreson de alia esperantisto, kiu eble povus helpi min.

Jen kelkaj demandoj:

-kiu estas la persono (la nomo ne estas vere klara por mi) en la atesto kaj kiaj estis liaj meritoj por Esperanto?

*-ĉu ekzistas, krom bronzaĵ ekzempleroj (kiel mi legis en artikolo) ankaŭ **oraj** medaloj (kiel menciita en la atesto)?*

-kiu estas la artisto-medalisto kiu kreis la medalon?

Danke kaj kompensocele mi kunsendas la plej aktualan numeron de nia senpaga revuo.

Mi antaŭdankas vin tutkore kaj

salutas vin,

amike kaj numismate,

Mag.Fil. Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

Fakdelegito pri numismatiko



Certificate - Bulgarian Esperanto Association

03.12.2023 21:53

Estimata,

Temas pri bulgara Jubilea Medalo el 1987, per kiu oni ankaŭ poste distingadis geesperantistojn pro kontribuo al la E-movado.

Oraj medaloj ekzistas - mi mem ricevis tian antaŭ kelkaj jaroj.

La persono nomiĝas Petar Totev el Sofio. Mi mem ne konas lin kaj liajn meritojn.

Al la aliaj demandoj mi bedaŭrinde ne povas respondi.

Mi demandos s-inon Maja Gorova, nuna vicprezidanto de BEA kaj filino de nia prezidanto el 1987 - Hristo Gorov.

Amike,

Mariana Evlogieva

04.12.2023 11:30

Saluton Sinjorino!

Multan dankon pro via tuja respondo. Krome gratulon pro la ricevo de tiu valora medalo.

Mi havas bildon de la bronza, sed ne de la ora. Estus interese povi kompari ilin. Ĉu eblas sendi bildon, mi petas?

Same dankon pro via preteco demandi s-inon Gorova! Mi estas preta je reciproka servo por vi aŭ BEA.

Amike kaj numismate,

Bert Boon

05.12.2023 15:24

Estimata samideano,

f-ino Mariana Evlogieva transsendis al mi vian leteron. Mi provos respondi al viaj demandoj

-kiu estas la persono (la nomo ne estas vere klara por mi) en la atesto kaj kiaj estis liaj meritoj por Esperanto?

La esperantisto nomiĝas Petar Totev, membro de Esperanto-societo "P. Mihajlova", Sofio, la 2-an de aprilo 1988

Bedaŭrinde, mi nenion povus rakonti por li, ĉar mi ne konas lin.

Bulgara Esperanto-Asocio honoris siajn plej aktivajn membrojn per la ora jubilea medalo, dediĉita al la 100-jara jubileo de Esperanto.

*-ĉu ekzistas, krom bronza ekzempleroj (kiel mi legis en artikolo) ankaŭ **oraj** medaloj (kiel menciita en la atesto)?*

Nia medalo estis nur ora. Mi ne havas informon por arĝenta kaj bronza.

-kiu estas la artisto-medalisto kiu kreis la medalon?

La aŭtoro de la ora medalo, dediĉita al la 100-jara jubileo de Esperanto estas la skulptisto el Bulgario – Bogomil Ĵivkov, kiu estas mia edzo. En nia ateliero ni havas liajn plaketojn, dediĉitaj al Esperanto. Mi sendas al vi iliajn fotojn.

Kun estimo Maja Gorova

06.12.2023 18:42

Kara samideanino!

Multan dankon! Por mi, kiel esperantisto kaj numismato, via lasta letero - kun ege interesaj aldonajoj- estis neforgesebla kaj agrabla surprizo.

Ĝis tiam mi supozis, ke en Bulgario ekzistus probable nur unu esperanta medalo, la jubilea, kiu jam estis en mia persona kolekto. Mi ja montris kaj priskribis ĝin antaŭe en eldonita numero de la revuo “Esperanta Numismatiko”. En kataloga broŝureto de 1995, kompilita de karmemora amiko kaj numismatika pioniro, Hans Jankowski, mi tiam trovis priskribon kun mencio de la metalo “bronzo”, kiu nun montriĝas esti erara. La artisto-medalisto, kiu estas via edzo tiam al ni ambaŭ estis nekonata. Aktuale, serĉinte informojn pri li en la Reto, mi eĉ malkovris, ke ankaŭ vi estas artistino-pentristino kaj ke vi ambaŭ kune ekspoziciis...

Preparante kaj kompilante surbaze de nia revuo plejeble multajn monerojn kaj medalojn por la “Unua Katalogo de Esperanta Numismatiko”, mi nun ege ĝojas, ke mi povos aldoni ankaŭ la plaketojn kreitaj de via edzo.

Tial mi kuraĝetas denove peti vian nemalhaveblan kunlaboron, kvankam la projekto ne vere urĝas. Por klarigi la bezonojn, mi aldone sendos al vi (malnovan) numeron petante, se vi konsentus, rigardi la rubrikon “Moneroj & Medaloj” por scii kiel aspektas la priskribo de medalo, sekve la rubrikon “Medalistoj” por havi ideon kiel la redakcio prezentas artikolon pri la kariero de medalisto, kiel via edzo.

Petante vin pripensi mian novan helpopeton, mi esperas, ke vi trovos por mi kaj por niaj legantoj iom da tempo por asisti kompletigi la aperontan katalogon surbaze de la kvar numeroj de 2024, do de la 11a jarkolekto, per kompletaj priskriboj de liaj esperantaj plaketoj.

Evidente, sekve mi sendos al vi ambaŭ ĉiun numeron, en kiu plaketo de via edzo estos montrita kaj priskribita!

Vin antaŭdankas mi tutkore, esperante, ke mi ne tro ĝenos vin ambaŭ.

Amike kaj numismate,

Bert (< Alberto) Boon - Belgio

15.12.2023 18:56

Estimata s-ro Boon,

Estis plezuro por mi tralegi vian leteron. Dankon pro la revuoj, kiujn vi sendis. Ŝajnas, ke mi komprenis kian informon vi bezonas kaj mi kun ĝojo plenumos vian peton. Mi esperas, ke la afero ne estas tre rapida, ĉar mi bezonas tempon por priskribi ĉiujn plaketojn. Se vi opinias, ke estas akceptebla, mi povus akompani iujn el ili kun fotoj de la eventoj, por kiuj ili estis kreitaj.

Kiom mi komprenis, mi devos sendi ankaŭ la biografiajn notojn de Bogomil Ĵivkov kaj verŝajne lian foton.

Do, mi provos esti korekta kaj detale priskribi la plaketojn. Se mi ion eraros, mi petos vian helpon! Anticipan dankon!

Amike kaj samideane – Maja Gorova

12.2023 16:18

Estimata Sinjorino Gorova,

unuavice mi petas vian pardonon pro la prokrasto de mia respondo. Ĉefe ŝuldas la laciga preparado de baldaŭa transloĝiĝo al alia domo. Tio kostas tempon kaj energion!

Mi vere estas kontenta kaj dankema pro via intenco kunlabori por la priskribo de la plaketoj de Bogomil.

Se eble por vi, mi volus jam aperigi en la venonta numero la biografiajn notojn pri via edzo, evidente kun lia foto kaj bildoj de kelkaj skulptaĵoj. Tio antaŭ la 15a de januaro, se eble.

La estontaj numeroj de 2024 aperos en la dua parto de la monatoj aprilo, julio kaj oktobro. Do en ĉiu el tiuj numeroj la priskribo de unu el la tri plaketoj, kies fotojn vi jam sendis al mi.

Mi volonte akceptas vian proponon aldoni al la priskriboj fotojn de la iamaj eventoj. Tio certe pliriĉigos la historian valoron de la prezentado.

Kiel promesite, mi sendos al vi kaj via edzo ĉiun numeron de la 11a jarkolekto!

Mi tutkore antaŭdankas vin kaj salutas vin ambaŭ

amike kaj numismate,

Bert Boon

04.01.2024 16:29

Estimata s-ro Boon,

unue mi deziras al vi feliĉan, sanan kaj sukcesplenan Novan jaron!

Rilate la biografion de mia edzo, baldaŭ vi ricevos ĝin, ankaŭ kun kelkaj fotoj de liaj skulptaĵoj. Mi komencis priskribi la plaketojn de Bogomil kaj post iom da tempo vi ricevos la tekston.

Amike Maja Gorova

05.01.2024 11:40

Estimata s-ro Boon,

mi sendas la materialojn por la unua numero de via revuo. Mi esperas, ke ili taŭgas por presado.

Amike Maja Gorova

05.01.2024 18:25

Estimata Maya,

Abundaj kaj taŭgaj estas la informoj kaj la bildoj kiujn vi sendis. Multan, koran dankon! ENA prilaboros plejeble akurate kaj respondece la tuton por la numero kiu aperos fine de januaro. Ankaŭ por ke Bogomil kiel artisto neniam estu forgesota en Esperantujo!

Amike kaj numismate,

Bert



25.12.2023 7:13

Tre kara Bert Boon,

Mi elkore dankas vin pro la informoj kun tre belaj fotoj en la revuo.

Mi deziras al vi kaj al via familio feliĉan novjaran saluton kaj bondeziron.

Mi esperas, ke novjaro kunportos al vi tre multe da ĝojo kaj sukceso. Pro tio vi fariĝos pli juna :-)

Plej amike,

Mukunda Pathik

Nepalo

25.12.2023 9:32

Mia kara Mukunda Pathik!

Multan dankon pro via tre afabla komento pri la ENA-revuo.

Al vi persone kaj al via familio mi deziras tre kore prosperan kaj kontentigan novan jaron. Gravas ankaŭ bonega sanstato! Vivu Esperanto!

Amike kaj numismate,

Bert Boon

Belgio

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

02.01.2024 11:47

Dankon, kara Bert! Same ankau al vi kaj al via ĉarma edzino Vivienne ĉion bonan en ĉi tiu nova jaro!

Amike,

Fejfi

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

11.01.2024 8:46

Al Sinjoro Bert BOON

Estimata Samideano:

Koran dankon pro Viaj novjaraj bondeziroj. Miaflanke mi deziras al Vi bonan sanon kaj pli da sukcesoj en Via esperantista laboro.

Neagu Doru

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

A N O N C O J

&

E V E N T O J



Bank of Canada Museum

@BoCMuseum

...

The people who promoted [#Esperanto](#), the universal language, also promoted a universal currency. A noble failure, a good story.

ow.ly/rR4L30mZdN5

[Post vertalen](#)



Traduko de la redakcio:

Kion diras la muzeo de la kanada banko:

“La homoj kiuj propagandis por la universala lingvo, strebis ankaŭ lanĉi internacian monunuon. Nobla elreviĝo, interesa historio!”

Varbilo por ENA!

Karaj membroj!

Bonvolu fojfoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!

Bert

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko” en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estis apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol naŭ jaroj ĝis 163 individuaj membroj kaj 25 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial onirajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉasrespondi: “Mi konsentasaliĝi”). Krome la NUR PERRETA revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tion eniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, ni klarigos kiel vi povas (ne devas!) elŭti la jam aperintajn numerojn. SENPETE sekve vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

Vi krome rajtas unue petiprovnúmeron!

Kun numismatajkamsamideanajsalutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”

bert.boon@skynet.be